Emmy Lang,

# Dort wo die Sonne küsst das Meer

Sanft wie die Sonne küsst das Meer
und zärtlich streicheln seine Wogen ihre Wangen,
noch muss sie zügeln ihr Verlangen,
hineinzutauchen für die Nacht und leer
zurückzulassen ihren Himmelsraum,
wo Mond und Sterne kaum
ersetzen können ihren Glanz und ihre Kraft -
und doch, das Wechselspiel ist meisterhaft.

Alsbald nach zartem sich berühren, sieht
die beiden Liebenden man rasch in sich versinken.
Fast scheint für immer zu ertrinken
der Tag, den es mit in die Tiefe zieht.
Am Horizont zeugt von dem Liebesspiele
das tiefe Schwarz der Nacht nur, das so viele
der Stunden, die dem Tod des Tages nicht entronnen,
verschlingt, bis in der Morgenröte sacht sie wiederkommen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* EMMY LANG *(∗1914-01-05 – †1944-11-21).*

*Arg-734-1481 (2012-12-28 18:12:29)*

*Tiu ĉi poemo aperis en 2002 en la germana semajna revuo “Hörzu”.*

Emmy Lang,

# Tie kie la suno kisas la maron

*tradukita de Manfred Retzlaff*

La Sun’ la maron delikate kisas jen,
karesas milde ĝiaj ondoj vangojn ŝiajn;
ankoraŭ devas bridi ŝi dezirojn iajn,
en ĝin mergiĝi por la nokto, en malplen’
lasante sian spacon enĉielan, kie
la luno kaj la steloj brilas idilie,
apenaŭ anstataŭigante forton ŝian. -
Ravite spektas ni la ludon, la genian.

Sed baldaŭ post tenera intertuŝo ĉi
ensinkas la amantoj unu en alian;
dronante malaperas en abismon ian
la tago, kiun tiras suben ŝi kun si.
Atestas nokto nur pri l’ ama interago,
kaj tiuj horoj, kiuj mortis kun la tago,
forsinkas ĉe la nigra limo horizonta,
revenas ili kun aŭror’ de l’ tag’ venonta.

*Traduko de la Germana poemo “Dort wo die Sonne küsst das Meer” de* EMMY LANG *(∗1914-01-05 – †1944-11-21) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04).*

*Arg-734-1482 (2012-12-28 18:03:02)*